



Guozhu

Poemoj

Volumo de hajkoj

2012 Ĉinio

100 hajkoj de Guozhu

☆001

Per hajk' ekzercas
mi, ĉar mallonge ja pli
facile versas.

☆002

Ravas min gaj' ke
pli malpli mi jam lernis
versplekti hajke.



☆003

Kie estas tem'
por poemo?--- En pluvet'
dorse sur azen'.



☆004

Neniĉel povas
vi Lushan koni, nur se
vin tie trovas.

☆005

Vent! Ne scipovas
vi legi. Kial paĝojn
do taŭze plovas?

☆006

Ŝi sidas muta.
Ĉu lace? Ne, ja triste
kun larmo guta.




☆007

Neĝblok' ĉe Yanshan
tiel grandas kiel mat'
en frosturagan'.

☆008

De la ĉielo
venas Flava Rivero
brue al celo.



☆009

Maren rapidas
akv' de Flava Rivero.
Ĉu vi ne vidas?

☆010

Ora pokalo
ne estu duonplena
al lunkristalo.



☆011

En alta halo
bedaŭras spegul' pri har'
sub neĝvualo.

☆012

Naĝas ĉe l' roko
fiŝetoj svarme ĉirkaŭ
aroma hoko.



☆013

Tra la fenestro
penetras fantazie
kvaka orkestro.



☆014

Apud salikoj
en pluvet' jen disiĝas
koraj amikoj.

☆015

Nur nub' sur ondo,
sed oni misprenas ĝin
por verda monto.



☆016

Verda montaro
fidele akompanas
kvazaŭ najbaro.

☆017

Solec-promeno
sur pado en printempa
flora ĝardeno.

☆018


Sinkas radio
sur la monumenton de
Han-imperio.

☆019

Nokta kontemplo
pri luna osmantsemo
en monta templo.

☆020

Tra nuboj glitaj
verŝiĝas lun', kaj vibras
flor-ombroj splitaj.



☆021

En frida lago
bildiĝas balustrado:
kolor-zigzago.

☆022

Sur klaraj ondoj
svelta dancas lotusaj
foliaj rondoj.

☆023

Post la festeno
ĉu ne pli persekutas
disiĝ-ĉagreno?

☆024

Trans sunsubiro
ĉirkaŭ vilaĝ' izola
frosta akvgiro.

☆025

Vento trakorta
balancis la bambuan
ombron senorda.

☆026

Tra pluvkurteno
alŝvebas muziko kaj
hirundreveno.

☆027

Plezurboato
glitas facile sur lag'
preter sonato.



☆028

Ĉiela bluo
vidiĝas ambaŭ super
kaj en la fluo.

☆029

Basa pokalo

kiel povus rivali

kontraŭ mistralo?

☆030

Pado senkota

zigzagas inter pinoj

al strand' ekzota.



☆031

Pontsilueto

sub mil steloj inspiras

al la poeto.

☆032

Turniĝas steloj
de Arĝenta Rivero.

Dancas mil veloj.



☆033

Venas vilaon
la lun' por aŭskulti min
legi Lisaon.

☆034

Mankas konanto.

Pro kiu do ludiĝas

patosa kanto?

☆035

Marŝo de miloj

da lioj sub nubtaŭzo

sen lunaj briloj.



☆036

Ĉirpadis griloj

lastnokte, dum senlime

sorĉas lunbriloj.

☆037

Vortojn engluti.

Kial? Antaŭ papago

ŝi devas muti.



☆038

Sur pino nestas

blanka bird'. En bambuoj

lampiroj restas.

☆039

Sennombre floras

printempo. Sed aŭtuna

frukt' pli valoras.

☆040

Kaban' subluna.

Kokeriko. Spur' sur pont',

sur prujn' aŭtuna.



☆041

La noktaj horoj
de Printempo valoras
pli ol mil oroj.



☆042

Ŝvebas nubaro,
flugas en silka pluvet'
hirunda paro.

☆043

En buduaro
ŝi ankoraŭ songas pri
sia husaro.

☆044

Morta husaro
ankoraŭ restas en song^h
de buduaro.

☆045

Pri nia vivo,
amo, sopiro kantas
kordoj de bivo.

☆046

Dum nub' alvenas,
la verda rivereto
ekmalserenas.

☆047

Fruktoj de saĝo
maturis disponeblaj
nur en oldaĝo.

☆048

Fantomaj lampoj
lake ornamas inter
pinoj sur kampoj.

☆049

Flugas liberaj
petaloj, kiuj movas
sonĝe leĝeraj.



☆050

Nubo malhelas
surkape. Certe nian
versadon pelas.



☆051

La ĉiela bril'
malaperis kaj flagris
alte steloj mil.

☆052

Sur la ondo-rul'
nun portas min trankvile
ŝip' kun mola lul'.

☆053

En modesta dom'
naskiĝis kaj kreskis mi
sen impona nom'.

☆054

La diligento
ĉu jam forflugis kiel
facila vento?

☆055

Aŭdu al kvivit'
de gaj hirundparo.
Ĉu por am-inviti'?

☆056

Legas sub lampo.

Fariĝas pli ĉifona

malriĉa trampo.

☆057

Nur rozpetalo,

sed vekis ĝi suspiron

pri vivfatalo.



☆058\

Kiel la tempo
forgutas el la vivo
kaj korprintempo.

☆059

Lazuras ciel'.
Mi ardis pro deziro.
Kulpas cia bel'.

☆060

Kisis frua stel'.
Mi kisis kun deliro.
Kulpas kismiel'.

☆061

Juneco kulpas,
ke dum kolombas koroj
la karno vulpas.

☆062\

Turkisa majo

ora tempo de amo

abundas gajo.



☆063

Ebria paro

feliĉe flustras en la

folia aro.

☆064

Ho, sensacio!

Tombon de du mil jaroj

trovis Ĉinio.

☆065

Viglas ĉirpado

en Mezaŭtuna nokto

fest-serenado.



☆066

Suda pejzaĝo

kiu plej sorĉe ĉarmas---


persik-vilaĝo.

☆067

Nokte. Tajd' ŝvela

portas nin ŝvebe flosi

al land' fabela.



☆068

Nokta kiosko,
loko por geamatoj
ŝirme de bosko.



☆069

Pluvduŝo hasta
lavas la verdan mondon
pli virge ĉasta.

☆070

Olda ŝoseo---
scenejo de heroa
praepopeo.



☆071

Tutan dekadon
ni suferas someran
varmegon gladon.

☆072

Ŝvebas petaloj

konkure al gazono

kvazaŭ al baloj.



☆073

Super la domo
brilas nova krescento,
tristas la homo.

☆074

Plezurboato
de Somera Palaco
glit' sur akvglato.

☆075

Sub la ventpelo
balanciĝas bambuoj,
flugas libelo.

☆076

Forta amaro!
ke senfrukte pasiĝis
mia junjaro.

☆077

Pluvsilkoj distaj
falas, vualas ĉion
sen lime tristaj.

☆078

Longas salikoj.
Leĝeras pluvoj. Ĉambre
klaras taktikoj.



Qiziyinren@520.51.com

☆079

Per ĵongla sprito
kateno transformiĝis
al rekvizito.

☆080

Poezia rav'
konsistas el perfektaj
rim', form' kaj enhav'.

☆081

Ni ambicie
ĉineskojn verku pene
kaj devkonscie.



☆082

Babil' intima
kun japanaj amikoj
en Hiroŝima.

☆083

Al lia sondo
ŝi nur alude kantis---
sprita respondo.

☆084

Pord' interpina.
Templo profunde dormas.
Pluvet' senfina.



☆085

Ĉio forpasis

tagnokte, senrevene.

Memor'amasis.



☆086

Oldaj okuloj
ja tiel akrapidas
kiel speguloj.



☆087

Nur poezio
ĉiam allogas min sed
ne ambicio.

☆088

Strasaj fiuloj
nun ŝajnigi sin perloj
per fiŝokuloj.

☆089

Kiel rapide
ke la tuta jaro for
flugis bolide!



☆090

Dum pluvoj gute
kisas pirflorojn, fermas
kortpordoj mute.

☆091

Dum pluvoj forte
pirflorojn frapas. Pordoj
ŝlosiĝas korte.

☆092-100



Hajkoj

--- al la geamikoj de la delegacio de la
Japana-Ĉina Amikeca Societo Esperantista -
Samideano, 亲爱同志们

vin kore bonvenigas 武汉世界语朋友

verda Vuhano ! 衷心欢迎您

Al veterano 祝德田六郎

Tokuda akompanu 健康永伴福寿长

eterna sano ! 先辈老益壮

Ho, Saĝa Ŝtono 只石智津子

pompe disfloru via 您有一个好名字

saĝa fruktdono ! 才华可盖世

(F-ino 只石智津子 ĝoje diras ke ŝia familia nomo signifas Saĝa Ŝtono.)

SinJOR' Harada, 原田英树君

frate mi dankas vin pro 相交有如兄弟亲

l' amikec' frata. 国柱谢意深

(kun granda surprizĝojo S-ro Harada trovis ke li kaj mi,

Guozhu, estas samaĝa, lernis E en la sama jaro kaj funkcias samrole en E-movado de sia urbo.)

Ginekologo 国井兵太郎

ĉu indas la vojaĝ pro I' 三国之旅兴味长

roman-allogo ? 名著美名扬

(al S-ro 国井兵太郎 tre plaĉas ĉina romano "Tri Regnoj" kaj ĝuste pro kies allogo li vizitas Ĉinion.)

Ĉarma aŭtuno, 秋高气又爽

benu fraŭlino Sato 佐藤小姐莫彷徨

kun la fortuno ! 会得有缘郎

En televido, 待到成果献

Sinjoro Mijaŝita, 宫下拍成电视片

ĝis la revido ! 珍重再相见

Nur akvostrio 白井勇少年

inter ni, do revenu 一衣帶水只等闲

brava Miĉio ! 后会定有缘

(12-jara amiketo 白井道朗 unuafoje vizitas Ĉinion sen akompano de siaj gepatroj, kaj kun admiro ni emas nomi lin Brava Miĉio.)

Kvankam transmara, 唐诗赠友人

tamen, vi proksimiĝas, 记取“海内存知己,

kvazaŭ najbara ! 天涯若比邻”

(hajkigo de ĉina klasika verso el poemo de Tang-dinastio.)

kun sincera amikeco dediĉas

Guozhu

1980-09-20

--- aperis en la adiaŭa numero de L'

OMNIBUSO (oktobro
decembro, 1980),17-a jaro n-ro 4(90),
p.12 sen ĉinigo.



**Apendic: Malnova eseo pri hajko verkita de
Guozhu 1980:**

Hajko — japana fiksforma poemo

Al komencanto, kiu volas lerni Esperantan poezion, mi konsilas komenci de tiu kun simpla skemo, kiu estas facila por legi, kompreni, memori kaj imiti ekzerce. Antaŭ ĉio mi rekomendas la skemon hajko, kiu eble estas la plej simpla en la Esperanta poezio, sekve tre taŭga por nia legado kaj memekzercado.

Hajko estas la japana vorto はいく skribita en Esperanto laŭ ĝia prononco.

Ĝi estas unu el la skemoj de japana poezio. Hajko konsistas el tri versoj, respektive de 5,7 kaj 5 silaboj, sekve ĝi ankaŭ estas alinomata kiel deksep-silabo. Versoj de hajko estas blanka (senrima) aŭ kun-rima (je la unua kaj tria versoj). Krome estas neniu alia devigo en ĝia Esp-igita formo.

La plej fama hajkisto en Japanio estis poeto Macuo Baŝo (松尾芭蕉 1644—1694). Li versis hajkojn dum tuta vivo kaj ĝuis la renomon de Majstro de Hajko. Hajkoj de Macuo Baŝo estas kun delikata priverso kaj kvieta animstato, sentoj de la poeto esprimiĝas ofte je naturaj pejzaĝoj. En sia poemaro <Eterna Bukedo> Kalocsay tradukis 4 hajkojn de Macuo Baŝo:

1.

Jen, — krio mola!

Ĉu estis voĉ' de l' Luno?

Ne! Voĉ' kukola.

2.

Kampoj herbhavaj!

Songĝloko de multnombraj

Herooj bravaj.

3.

Taban' ludetas

sur floroj. Ĝin ne manĝu,

Paser', mi petas.

4.

Lag' forlasita,

kaj muta. Plaŭd', ensaltis

rano subita.

La esp-igoj far Kalocsay konservis la saman formon je nombro de versoj, de silaboj kaj la rimaranĝo. Tia esp-igo estas fidela je la originalo formo kaj tre plaĉas al mi. Foje mi kompare legis la ĉinigon de la sama poemo. Mi legis nur paron da sepsilabaj versoj: 大竹林里明月光，间闻杜鹃声感伤。

El la supre menciitaj kvar hajkoj, al mi plej plaĉas la kvara, ĉar ĝi per 17 silaboj redonis tiel vivecan bildon, ke ni povas vidi la pejzaĝon kaj aŭdi la sonon. Vere admirinda! Kaj mi mem faris ĉinigon ankaŭ en 17 ĉinaj ideogramoj:

幽静古池塘。

扑通！蛙跃水中央，

砰然发清响。

Tiu ĉi hajko ankaŭ vekis interesiĝon de Osaka Kenĵi, la fama veterano de la japana EM. Li eĉ versis alian

poemon kun sama enhavo:

Laget' malnova...
neni' en aŭd'.
Jen rano – plaŭd'!
Silent' denova.

Resume la silaba nombro estas pli multa ol tiu de hajko nur je unu, tamen aperas pli multa enhavo ankaŭ je unu verso: Silent' denova,

Legantoj do vidas la rekvietiĝon post la ensalto far la rano, kaj ankaŭ povas imagi kiel la lemnoj unue disiĝis kaj poste rekunuiĝas. Mirinde!

Pro la rekomendo kaj versado far japanaj s-anoj, la skemo hajko eniris Esp-an poezion, kaj estas ankaŭ tre multe da neĵapanaj Esp-poetoj versis laŭ tiu ĉi skemo. Ankaŭ la ĉina poeto Armand Su. En 1965 Armand Su versis serion el 8 hajkoj por partopreni la poem-konkurson lanĉita de Oomoto. Rezulte, inter la 15 premiitoj la unika ĉino estis Armand Su. Mi ĉinigis 3 el liaj 8 hajkoj:

La pensoj gute
elfluas tra l' plu' sur
paperon mute.

点滴地思想
沿着笔端默默地
流向纸面上

L' okuloj ĉarmaj
ne kaŝas la perfidon
per gutoj larmaj.

迷人的眼睛
因了泪珠儿不能
将负心掩藏

Kiam ne ardas 如果拥抱时
Ŝi en brakumo, ankaŭ 她没热情，你的吻
via kis' tardas. 也将会迟疑。

Por versi hajkon ni bezonas nemultajn silabojn kaj nur paron da rimo, tial ĝi tre taŭgas al komencantoj kiuj volas fari interrimigan ekzercadon. Ĉinaj esp-istoj ja povas ricevi inspiron el antikva ĉina poezio, preni unu aŭ du ĉina(j)n frap-verso(j)n kaj reversi ilin hajko.

Ekz-e:

Vent'! Ne scipovas
vi legi. Kial paĝojn
do taŭze blovas?

Ho, ĉu tio ne estas la famaj (malfeliĉigaj) versoj“清风不识字，何必乱翻书”？ Jes, tamen jam vestita hajke.

Jen alia ekzercado je vira rimo:

Kie estas tem'
por poemoj? – En pluvet'
dorse sur azen'

Tio estas laŭ etoso de la vesoj de Lu You(1125-1210) :
“细雨骑驴入剑门”， pri kiu estiĝis multaj ĉinstilaj
pentraĵoj.

Pri tia ekzercado mi havis memkonfeson:
Per hajk' ekzercas

mi, ĉar mallonge ja pli
facile versas.

Ĉar la silabnombro en ĉiu verso de hajko estas tre malmulta (5 aŭ 7), tial ofte okazis ke oni ne povas finskribi plenan frazon en unu verso, tiam la versanto rajtas daŭrige skribi al la sekva(j) verso(j). En Esperanta poezio tio estas nomata “transiro”, tute permesata, kaj tiu permeso ankaŭ donas oportunun por sin ekzerci.

Japanaj esperantistoj tre ŝatas hajkon. Ili eĉ fondis grupojn kia Hajkista Klubo. El la libro-katalogo de lastaj jaroj ni povas vidi ke la Hajkista Klubo de Osaka iam eldonis verŝajne jarkolektojn de hajkoj, ĉu originale versitaj aŭ tradukitaj, ekz-e Suito '69, Etudo '68, Kvinteto '69, Kapriĉo '70.

En lastaj jaroj, pli kaj pli oftiga la intervizitaj amikecaj delegacioj de Ĉinio kaj Japanio. Hajko ankaŭ ofte estas uzata por esprimi sian amikecon. Ĉina fama poeto Zhao Puchu(1907-2000) pli ol unu foje versis hajkojn en la ĉinaj ideogramoj. En septembro de 1980, venas al nia urbo Wuhan sep-persona delegacio de la Japana-Ĉina Amikeca Societo Esperantista estrata de la fama veterano s-ro Tokuda Rokuro. Mi havas la feliĉon intervidi kun la gastoj. Post konsidero mi opinias ke donaci poemon certe estas bona ideo. Do mi versis serion da hajkoj kaj intence metis la nomon de ĉiu gasto en la hajkojn. Mi deklamis tion en la adiaŭa kunsido. Tio vekis grandan ĝojon de s-ro

Harada Hideki, prezidanto de la Esperanto-Asocio en Okayama. Li parolis:“Mitute ne imagis ke en Ĉinio troviĝas tiel bona hajkisto!”Poste dank' al lia rekomendo miah hajkoj estas publikigita en n-ro 4, volumo 17 de la japana Esperanta revuo L'omnibuso. Interalie la plej lasta hajko legiĝas jene:

Kvankam transmara,
tamen, vi proksimiĝas
kvazaŭ najbara!

Fakte tio estas Esperanta hajkigo de famaj versoj de Tang-poemoj de Wang Bo (849-675). Se vi havus la ŝancon intervidiĝi kaj reciproki hajkojn kun japanaj esperantistoj, kiom neforgesebla epozodo tio estos!

Noto: En japana lingvo oni rajtas versi hajkon eĉ sen rimoj.

<http://www.elerno.cn/literaturo/liter008.htm>

Modelo · Inspiro · Ŝtupo

— Postparolo al la <Poemoj de Guozhu·Volumo de hajkoj>

Esperanta poezio estas granda ĝardeno kie prospere disfloras centoj da floroj. La plej granda kolekto de originalaj Esperantaj poemoj sendube estas <Esperanta Antologio> kompilita de William Auld (unua eldono en 1958, dua eldono en 1984). Jen monumenta verko: Impone dika, enhavoriĉa, kun buntaj poemoj en diversaj formoj. Nur en 1971 mi havis la feliĉon pruntis unu ekzempleron de <Esperanta Antologio>. Mi estas frapita de ĝia ĉarma beleco. Mi mankopiis ĝin de la unua ĝis la lasta litero. Kiam mi rondvizitis en tiu ĉi granda ĝardeno, mi trovis japaneskon (kun hajkoj kaj tankaĵoj kiel reprezentantoj), jam sufiĉe matura kaj disvastigita. Sed vidiĝas nenia ĉinesko.

Japanesko donis al mi tri utilojn: Modelo, inspiro, ŝtupo.

Modelo: kiu donas al ni ekzemplon, ke ankaŭ la fiksoformoj de la orienta poezio estas enkondukebla en la Esperantan poezion.

Inspiro: Se fiksoformaj skemoj de la japana poezio sukcesas eniri la Esperantan poezion, do laŭ rezonado, ankaŭ tiuj de la ĉina poezio povas fari la samon.

Ŝtupo: Tamen la nombro de la ĉinaj fiksoformaj

skemoj estis tiel abunda ke ĝi eĉ superis 2000, ni ne povas enkonduki ĉiom da ili per unu fojo. Ni devas esplori la manieron, vojon, formulon de la enkondukado. Japanesko certe funkcias por ni bona ŝtupo.

Do mi ankaŭ lernas versi hajkojn en Esperanto. En tiu ĉi eLibro kolektiĝas 100 hajkoj de Guozhu. Poste, ĉar mi turnis min al la iniciato, kreado kaj disvastigo de ĉineskoj, mi malofte versis hajkojn.

La eLibro <Poemoj de Guozhu. Volumo de ĉineskoj> estis enretigita jam antaŭ du jaroj. Tiu ĉi volumo de hajkoj nun aperas kiel fratina volumo al tiu de ĉineskoj. Poemoj en ĉi volumo, kvankam laŭ japana skemo, tamen kiel eble kun ĉinaodoro laŭ mia peno. Tempo de ĝia apero estas malpli frua je du jaroj ol la volumo de ĉineskoj. Sed multaj pecoj kreiĝis pli frue ol miaj ĉineskoj.

Kun humilo de komencanto mi dediĉas la poemaron (hajkaro versita de ĉina esperantisto) al japana Esperanto-movado. Samtempe mi ankaŭ pacience atendas kun espero: ke iam aperos poemaro de ĉineskoj kiun versos iu japana Esperantista poeto.

Guozhu (Eĉino)

2012-02-03

